

Friedrich Schiller,  
Al la ĝojo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Ĝojo, bela sparko dia,  
de l' ĉielo vi filin',  
ĝoje staras ni en via  
templo kaj adoras vin.  
Sorĉe ĉio religiĝas,  
kio apartigis sin,  
ĉiuj homoj gefratiĝas,  
kie vi restigas vin.

Ĥoro:

Estu chirkaŭbrakumitaj,  
lasu kisi vin, homar' !  
Estu unu amikar'  
ĉiuj homoj disigitaj!<sup>2</sup>

Se vi faris grandan ĵeton  
kaj amikon gajnis vi,  
aŭ akiris virineton,  
kunjubilu vi kun ni !  
Ja – se vin nur amas iu  
en la bela, vasta mond' !  
Kiu restas sola, tiu  
plore iru el la rond' !

Ĥoro:

.....  
.....  
.....  
.....

.....  
.....  
.....  
.....  
.....  
.....  
.....

...

Friedrich Schiller,  
Al la ĝojo

*tradukita de Kálmán Kalocsay*

Ĝoj' ! Fajrero belradia!  
Elizea di-filin' !  
fajrebrie ni al via  
templo iras, preĝi vin.  
Ĉesu, de vi sorĉigate  
de l' rigora mod' la ŝir',  
ĉiuj homoj sentas frate,  
se vi ŝirmas per flugil'.

Ĥoro:

Jen brakumoj al milmiloj,  
Jen ĉi kis' al tuta mond' !  
Fratoj! super stela rond'  
loĝas patro por ni, filoj!

Se la granda ĵet' bontrafis  
kaj amikon gajnis vi,  
se virina am' vin ravis:  
Vin enmiksu kun ĝojkri' !  
Jes, se eĉ nur unu koro  
estas via en la mond' !  
Kaj se ne – do vin kun ploro  
ŝtelu for el nia mond'.

Ĥoro:

Ĉiu sub ĉielo glata  
donu sin al simpati',  
al la steloj gvidas ĝi,  
kie tronas Nekonata.

Ĉiu sur la brust' Natura  
suĉas sukcon de la ĝoj'  
kor' malbona, koro pura  
sekvas ŝin laŭ roza voj'.  
Ŝi vinberojn, kisojn donas  
kaj amikon sen pridub',  
en volupt' la vermo dronas,  
vidas Dion la kerub'.

...

<sup>2</sup>Tiu verso ne tute redonas la enhavon de la koresponda origina strofo.

Ĥoro:

.....  
 .....  
 .....  
 .....

Ĥoro:

Ĉu genuas vi, milmiloj?  
 Vi kreinton sentas, mond' ?  
 Serĉu super stela rond',  
 loĝas Li trans astro-briloj!

.....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....

En eterno de l' Naturo  
 Ĝojo estas la risort'.  
 En la mondhorloĝ' por kuro  
 radojn pelas ŝia fort'.  
 Ŝi el ĝerموj logas berojn,  
 sunojn regas ŝia gvid'  
 Ŝi tra l' spaco rulas sferojn  
 trans la astronoma vid'.

Ĥoro:

.....  
 .....  
 .....  
 .....

Ĥoro:

Kiel sur la pompaj vojoj  
 sunoj sur la firmament',  
 gaje marŝu, frata gent',  
 kiel venki la herooj!

.....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....

Esploriston ŝi alridas  
 el la fajrspegul' de l' Ver',  
 sur krutaĵ' de l' Virto gvidas  
 ŝi la homon de toler',  
 sur Kred-Monto sunobrila  
 flirtas ŝia flag' el or',  
 ŝin tra l' fendo ĉerk-kovrila  
 vidas ni en anĝel-ĥor'.

Ĥoro:

.....  
 .....  
 .....  
 .....

Ĥoro:

Ho toleron, paciencon,  
 fratoj, por pli bona mond'!  
 Donos super stela rond'  
 granda Dio rekompencan!

.....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....

Ĉu pripagi diojn? Vanto!  
 Ĉu simili? Bela pen'!  
 Venu ĝoji kun ĝojanto  
 la mizero, la ĉagren'.  
 Venĝ' ? Koler'o? En forgeson!  
 Jen pardon' al malamik'!  
 Liaj larmoj havu ĉeson,  
 lin ne boru pento-pik'.

...

...

Ĥoro:

.....  
.....  
.....  
.....

Ĥoro:

En ŝuldlibroj plu nenio!  
Mondon regu harmoni'!  
Fratoj! Kiel juĝis vi,  
tiel juĝos pri vi Dio!.....  
.....  
.....  
.....  
.....  
.....  
.....  
.....Ĝojo ŝaŭmas en pokaloj,  
en orsango de l' vinber',  
mildon trinkas kanibaloj,  
heroecon malesper'.  
Se rondiras la botelo,  
fratoj, saltu el la sid',  
ŝprucu ŝaŭmo al ĉielo:  
Jen ĉi glas', por Bon-Spirit'!

Ĥoro:

.....  
.....  
.....  
.....

Ĥoro:

Himnas Lin abismo stela,  
serafar' kun glora cit'.  
Jen ĉi glas' por Bon-Spirit',  
supre, trans la tend' ĉiela!.....  
.....  
.....  
.....  
.....  
.....  
.....  
.....En suferoj: firma forto,  
al senhelpaj: ŝirma Brust',  
eterneĉ' al ĵura vorto,  
eĉ al malamiko: just'.  
Virfiero kontraŭ tronoj,  
kvankam sangon kostu spit',  
al merito estu kronoj,  
kaj perejo al insid'!

Ĥoro:

.....  
.....  
.....  
.....

Ĥoro:

Fermu vin en sankta rondo,  
Ĵuru do kun glaso-lev',  
pri l' fidelo al la Dev',  
je l' Reganto de l' Stel-Mondo!

*Traduko de la Germana poemo "An die Freude" de FRIEDRICH SCHILLER (Frederiko Ŝilero, \*1759 – †1805) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1982.*

*Arg-133-264 (2004-01-16 21:22:19)*

*Traduko de la Germana poemo "An die Freude" de FRIEDRICH SCHILLER (Frederiko Ŝilero, \*1759 – †1805) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, \*1911 – †1976) en 1958.*

*Arg-133-263 (2004-01-16 21:13:09)*